

KKPS IV – La reveno de la klaĉoj

La Klaĉ-Kunveno Post-Somera revenas al siaj radikoj! La kvara renkontiĝo, de la **28-a ĝis la 30-a de oktobro 2016**, okazos denove en Delft en la Kruituis.

En tiu loko okazis ankaŭ la unua KKPS, en 2012. Ĉi-foje tamen estos sufiĉaj dormlokoj kaj neniu bezonos tendumi en malvarmo (tio tamen eblas, se iu insistas). Ne maltrafu!



Delft troviĝas meze inter la grandaj urboj de Nederlando kaj estas bone atingebla de la flughavenoj de Amsterdam, Eindhoven kaj Brussel. La renkontiĝejo troviĝas 100 metrojn for de la trajnstacio.

Jen la kotiztabeloj. Dekstre por NEJ-membroj kaj NEJ-patronoj, kaj individuaj membroj de TEJO.

Maldekstre por la resto de la homaro.


	Benelukso	Okcidenta Eŭropo	Resto
30+	€60	€50	€45
20-29	€50	€45	€40
4-19	€40	€35	€30
3-	€10	€10	€10

	Benelukso	Okcidenta Eŭropo	Resto
30+	€50	€40	€35
20-29	€40	€35	€30
4-19	€30	€25	€20
3-	€10	€10	€10

La unua aliĝperiodo daŭras ĝis la fino de julio. En la dua aliĝperiodo la kotizoj plialtiĝos per 5€, ĝi daŭros ĝis la 15-a de oktobro. Malfruaj aliĝantoj, post la 15-a de oktobro, pagos ankoraŭ 10€ pli.

Por pli multaj informoj, aliĝilo, listo de aliĝintoj kaj arĥivo de Pos-Amikoj, vizitu

kkps.esperanto-jongeren.nl



Pos-Amiko

Somero 2016, Numero 17

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Esperanto-movado ne plu serioza
1. Gustuma sesio dum IJK
2. Socia vivo kolapsas pro kultura ĉefurbo
2. Nova atako al fundamento
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.
Redaktoro: Koko Poso
kkps.klackunveno@gmail.com
<http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko>

Esperanto-movado ne plu serioza

La junulara Esperanto-movado, kutime la granda ekzemplo de seriozeco, lastatempe sin perdis en senlima ludemo. La tabloludantoj ĉiam estis minoritato en la movado, sed ili okupadas pli kaj pli okulfrapan lokon en la kongresoj. Estas nun preskaŭ devigo, ke en kongresejo krom trinkejo kaj gufujo ekzistu ankaŭ ludejo. Mia plej ŝatata renkontiĝo, la Klaĉ-Kunveno Post-Somera en Nederlando, eĉ iam havis ludojn kiel kongresan temon!

Ĉu temas pri konspiro? Ĵurnalistoj de la Pos-Amiko malkovris dokumentaron, kiu nomiĝas Kartoj kontraŭ Esperantujo. Ĝi ŝajnas enhavi detalan priskribon de la Esperanto-movado kun sugestoj kiel sabotaĝi ĝin. Ĉu la pasintsomeraj okazaĵoj dum la komitatkunsido, kiuj similis al Ludo de Tronoj, rilatas al ĝi? R. Jeziorowska, atestanto de la okazaĵoj kaj organizanto de la IJK, neas tion:

“Nu damne ne, tio tute ne veras. Simple temis pri revolucio en la komitato, ne pri iu ludo aŭ konspiro. Ne forgesu, ke nian lingvon ja kreis Ludo-viko. Sed por iĝi pli seriozaj ni nun elektis la kongresan temon *aktivado*.”

Gustuma sesio dum IJK

La eksperimento pri ligo inter vodko kaj ebrieco de doktoro B. Telo estas nuligita. Anstataŭe dum la IJK okazos komparado de gustoj de diversaj vodkoj. Interesiĝantoj povas enskribiĝi en la trinkejo post la koncertoj.

Socia vivo kolapsas pro kultura ĉefurbo

En diversaj okcident-Eŭropaj landoj ekestas kompleta ĥaoso dum la somero. Trajnoj ne plu iras, flughavenoj ŝtopiĝas, nenio plu puriĝas. La strikemo inter Francoj kaj Belgoj iom kulpas, sed plej mankas la ĉiam laboremaj Poloj.



Vi povos longe atendi, sed via trajno ne venos.

Kien ili malaperis? Granda plejparto revenis al sia hejmlando por viziti Vroclavon, la Eŭropan Kulturalan Ĉefurbon de 2016. Poloj estas tre kulturamanta popolo, ĉiam pretaj je gustumado de ekzotikaj likvoroj aŭ je serioza filozofa debato kun Rusoj. En tiu ĉi kulturjaro la averaĝa literaturizado kreskis je 100%, ĉar aperis populara libro pri bieroj.

Ni povas nur rekomendi al la viktimoj de la ĥaoso, ke ili uzu la paŭzon por lerni iom la polan lingvon. Certe post la somero vi volos pridiskuti la literaturajn temojn de Mickiewicz kun via pola riparisto!

Nova atako al fundamento de Esperanto

La fundamento de Esperanto, la plej grava verko en homa historio post la Pos-Amiko, nu plu ricevadas la respekton, kiun ĝi iam havis inter Esperantistoj. Ŝajnas kvazaŭ nun ĉiu nova kantisto devas enkonduki siajn proprajn terminojn aŭ sufiksojn por tiri la atenton. Kaj nun la organiza teamo de la IJK aliĝis al nova danĝera modo: forigo de majuskloj. Same kiel oni uzas iksojn anstataŭ ĉapeligi literojn, oni foje antaŭmetas kradsimbolon anstataŭ majuskligi literon (aŭ foje eĉ faras ambaŭ!). Tiu metodo estas priskribita en neniuj kurslibroj aŭ gramatika libro, sed tamen populariĝas.

Ekzemploj estas mesaĝo de la volontulo de TEJO "Hodiaŭ aperis la unua intervjuo kun la nova prezidanto de TEJO, Michael Boris #Mandirola" kaj la temo de la nuna IJK: #aktivado. Ni rekomendas al niaj legantoj raporti tiajn okazojn ĉiam al la plej proksima gramatika policisto.

NEJ-Novaĵoj!

Renaskiĝo per ludotagoj

Ĉar esperanta movado neniam povas esti tro vigla, NEJ decidis organizi ludotagojn. La ideo estas kunigi junulojn en malserioza etoso, uzante la malmultekostajn grupbiletojn de la Nederlandaj fervojoj. Ĝis nun okazis kvar:

- La unua ludotago okazis la 20-an de februaro en Ede. Ni estis 15-ope en la kutime un-upersona loĝejo. Sed la spaco - dank' al bona etoso, bunta oferto de tabloludoj, sociemo kaj ludemo de ludintoj - tute ne mankis. La ludotago do fariĝis granda sukceso.
- La dua ludotago okazis la 12-an de marto en Utrecht. Ankaŭ ĉi-foje la spaco ne estis abunda, sed 16 aliĝintoj sukcesis bonege amuziĝi ĝis la fino de la tago - alivorte: ĝis la forveturo de la lastaj nenoktaj trajnoj. :)
- La tria ludotago, kiu okazis la 1-an de majo, eluzis la okazon, ke la tagon antaŭe okazis la malferma tago de la Centra Oficejo de UEA. En Rotterdam kolektiĝis 12 ludantoj.
- La kvara ludotago ĵus okazis la 11-an de junio en 's-Hertogenbosch, gaste ĉe ludoklubejo. Multaj el ni neniam vidis tiom multe da ludoj en unu loko kune.
- La kvina ludotago okazos dum la trajnkaravano al JES.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Vi ŝatos vian horoskopon

Taŭro: Vi malkovros, ke pli indas kulturo ol cenzuro.

Ĝemeloj: Vi ekhavas mojosan ideon por internacia vespero, sed neniu volas kunludi.

Kankro: Via patrino pli bone ukulelos ol vi.

Leono: Vi maltrafos feston pro kusenbatalo.

Virgulino: Post geedziĝa festo vi ne plu estos.

Pesilo: Vi dormas kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi misaĉetos supon anstataŭ sapon.

Kévin M.: Tiu ĉi horoskopo evidentiĝos malĝusta.

Sagitario: Vi ekdormos dum sendorma nokto.

Kaprikorno: Vi kreos klaĉon por kontribui al KKPS.

Akvisto: Nuligu ĉiujn viajn planojn por aŭgusto.

Fiŝoj: Vi konfuziĝos pro la veraĵoj en tiu ĉi Pos-Amiko.

Senpaga vojaĝo al Italujo

Tri membroj de NEJ, Joop, Rogier kaj Spencer, vojaĝis senpage al la Internacia Junulara Festivalo en Italujo dum pasko.

Ili ricevis la repagon, ĉar ili partoprenis en trejnado por trejnistoj. La trejnado okazis dum la tago, vespere eblis festi kun la resto. La dua parto de la trejnado okazos en la IJK en Polujo; tie nepartoprenintoj povos vidi kaj sperti la rezultojn.

La vojaĝo al la IJF iĝis iom malfacila pro la deziro eviti Bruselon tuj post la atakoj, sed finfine la haste organizita kromvojo sukcesis.